STATUTO de ITALA ESPERANTO-FEDERACIO

aprobita la 3-an de junio 2010

Titolo I. NOMO KAJ CELO

1. (Intenco)

Itala Esperanto-Federacio (I.E.F.), kultura asocio sen profita celo, fondita en Florenco la 21-an de marto 1910 kaj starigita kiel Morala Institucio per la D.P.R. 28-a de junio 1956 n-ro 1720, kunigas kaj organizas tiujn homojn, kiuj, emantaj kontribui al faciligo de interpersonaj rilatoj, solidaro kaj paca interpopola kunvivado, kontraŭ ĉia diskriminacio, kaj aparte tiu lingva, ĉar ĝi estas malagnosko de la popola kultura identeco, sin devigas por disvastigi instruadon kaj uzon de la Internacia Lingvo Esperanto, kia ĝi estas difinita de la "Fundamento de Esperanto" de Ludoviko Lazaro Zamenhof kaj de la decidoj de la "Akademio de Esperanto". IEF agnoskas la defendon de la personaj rajtoj kaj la plenan respekton de la libereco kaj digno de ĉiuj membroj laŭ la principoj de demokratio kaj egaleco.

2. (Operacia maniero)

Itala Esperanto-Federacio:

a) reprezentas la italan esperantistan movadon ĉe la naciaj kaj lokaj institucioj, antaŭ la publiko kaj la monda esperantista movado;

b) antaŭenigas en ĉiuj medioj la kono de esperanto, kuraĝigante ĝian uzon kaj aplikojn, por doni solvon al la internacia lingva problemo;

c) inspirigante el la idealoj de esperanto, antaŭenpuŝas solidarecajn iniciatojn celantajn helpi pli profundan kulturan integriĝon inter homoj kaj popoloj malsamlingvaj;

d) promocias kursojn de la lingvo esperanto kaj kunlaboras kun la Itala Instituto de Esperanto por efika instruado;

e) por realigi la instituciajn celojn plenumas servojn al la membroj kaj al kromaj personoj kaj prizorgas la eldonadon de verkoj, kaj itallingvaj kaj esperantlingvaj, ankaŭ ilin transdonante al kiu ajn sed plejparte al siaj membroj;

f) organizas kaj kunordigas kulturajn kaj informajn manifestiĝojn.

3. (Aŭtonomeco)

I.E.F. estas aŭtonoma kultura institucio, neŭtrala rilate al politikaj kaj religiaj ideologioj; ĝi rajtas tamen akordiĝi por kunlaboro kun personoj kaj instancoj kun celoj ne malakordaj kun tiu ĉi Statuto kaj aparte kun esperantistaj asocioj.

4. (Konvencioj)

Kadre de sia neŭtraleco, I.E.F. rajtas akordiĝi por reciproka kunlaborado kun ĉiaspecaj organizoj kaj institutoj, ankaŭ internaciaj, por atingi siajn laŭstatutajn celojn. Kaze de konstanta kunlaboro, la koncernan decidon prenas la Asembleo.

Titolo II. SIDEJO

5. La nuna sidejo de I.E.F. estas en Milano, strato Villoresi 38.

Titolo III. MEMBRARO

6. (Aliĝo)

Al I.E.F. povas aliĝi fizikaj aŭ juraj personoj, organizoj aŭ asocioj, kiuj ĉiam rajtas je ununura voĉo. Por aparteni al I.E.F. necesas fari prian peton, akcepti kaj observi la Statuton, pagi ĉiujare la kotizon. La aliĝo startas la unuan de januaro de la jaro, dum kiu fariĝis la enpago de la unua kotizo. La Estraro rajtas rifuzi la aliĝpeton, precizigante la kialojn. La koncernato rajtas apelacii, ĝis unu monato de la komuniko, al la Nacia Konsilantaro, kiu decidas definitive.

Ne eblas partopreni en la asocia vivo por malpli ol unu jaro.

7. (Rezigno kaj ekskludo)

La aliĝo al I.E.F. ĉesas:

a) pro rezigno, kiu efikas senprokraste de la dato de ricevo de la koncerna komuniko;

b) pro kontestita pagmalfrueco;

c) pro ekskludo proklamita de la Estraro sekve de agado kontraŭa al la Statuto, aŭ pro kialoj kiuj povas senestimigi la esperantistan movadon; la Estrara decido efikas nur se validigita de la absoluta plimulto de la membroj de la Nacia Konsilantaro, post aŭdo de la koncernato.

8. (Membrokotizo)

La membroj pagas jarkotizon, kies konsisto estas fiksita de la Asembleo.

La kotizoj de la membroj estas nek transdoneblaj nek repageblaj.

La kunvivantaj familianoj de iu membro, la handikapuloj kaj la junuloj, kiuj ne iĝas 25-jaraĝaj dum la koncerna jaro, pagas duonon de la ordinara kotizo, se la asembleo ne difinis pli altan tarifon.

Membro, paginta ĉiujare almenaŭ dekoble la ordinaran kotizon, estas garantianto; paginta ĉiujare almenaŭ trioble la ordinaran kotizon estas subtenanto.

La Nacia Konsilantaro povas nomumi honora membro, kun samaj rajtoj kiel ĉiuj membroj, tiun, kiu aparte kontribuis por la atingo de la celoj de I.E.F.

9. (Organizo)

La membroj aliĝas al I.E.F. individue aŭ pere de la grupoj, kiujn ili starigis. La grupoj ĝuas administran, financan kaj posedaĵan aŭtonomion; ili estas aŭtonomaj pri la plenumado de la loka agado, tamen havas la jenajn devojn:

a) konformigi sian statutojn kaj agadojn laŭ la direktivoj de I.E.F.;

b) komuniki siajn iniciatojn al la kontrolorganoj;

c) aligi ĉiujn membrojn;

d) havigi al I.E.F., fine de ĉiuj asocia jaro, raporton pri la farita agado;

e) sindevigi por destini, okaze de malfondo, sian netan posedaĵon al I.E.F.

La lokaj grupoj kun almenaŭ dek membroj rajtas reteni el la kotizoj, priskribitaj en la antaŭa artikolo, procentaĵon difinitan de la Estraro.

La junaj membroj konsistigas la Italan Esperantistan Junularon, kiel junulan organizaĵon de I.E.F.

10. (Rajtoj)
Ĉiuj membroj, kadre de la celoj difinitaj de ĉi tiu Statuto, rajtas utiligi la faciligojn kaj servojn liveritajn de I.E.F.

Titolo IV. POSEDAĴO

11. Konsistigas la posedaĵon de I.E.F.: la membrokotizoj, la propraĵoj el legacoj kaj donadoj aŭ akiritaj, la eventuala administra restaĵo, kaj ĉiu alia enspezo ankaŭ el kromaj komercaj aktivecoj, celanta atingon de la instituciaj objektivoj.
Malpermesatas la disdivido, eĉ en nerekta formo, al membroj aŭ aliaj subjektoj, de profitoj, monsumoj, kapitalorezervoj kaj de ĉiu alia enspezo, kiu konsistigas la asocian posedaĵon.

Titolo V. ORGANOJ DE I.E.F.

10. Organoj de I.E.F. estas:
a) la Asembleo de la membroj;
b) la Nacia Konsilantaro;
c) la Prezidanto;
d) la Estraro;
e) la Kolegio de la Kontrevizoroj;
f) la regionaj delegitoj.

a) ASEMBLEO

13. (Taskoj)
La Asembleo de la membroj estas kunvokita unu fojon jare de la Estraro, laŭeble okaze de la Nacia Kongreso, kaj krome kiam prezentiĝas ties neceso aŭ prie faras laŭnoma peto la plimulto de membroj de la Nacia Konsilantaro aŭ dekono de la membroj aŭ, pri problemoj koncerne la financan situacion, la Kolegio de la Kontrevizoroj.
La Asembleo decidas rilate al:
1) la morala kaj financa raporto, kun la posedaĵa stato kaj la administra bilanckonto de la pasinta jaro, prezentita de la Nacia Konsilantaro kaj kun la raporto de la Kontrevizoroj;
2) la proponoj koncerne la koston de la ordinara membrokotizo;
3) la proponoj pri aliaj temoj koncernaj la asocian aktivecon.
Krome la Asembleo elektas la anojn de la Nacia Konsilantaro kaj de la Kolegio de la Kontrevizoroj.
Pri eventualaj temoj ne enigitaj la kunvokanoncon, la asemblea voĉdono estas konsiderata nur kiel rekomendo.
Por decidi pri apartaj fakoj eblas kunvoki la Asembleon en formo de referendumo, laŭ manieroj difinitaj per regularo.

14. (Kunvoko)
La Estraro, per kunvokilo, komunikas al ĉiuj membroj la diskutotajn temojn kaj la liston de kandidatoj almenaŭ dek tagojn antaŭ la fiksita asembledato, kune kun anonco pri la unua kaj dua kunvokoj kun ties loko kaj horo. La dua kunvoko povas okazi ne malpli ol unu horon post la unua.
La diskutotaj temoj estas difinitaj de la Estraro. Al tiuj aldoniĝas la proponoj prezentitaj de la Nacia Konsilantaro aŭ de la Kolegio de la Kontrevizoroj, kaj krome tiuj esprimitaj de membroj, kiuj alvenis motivitaj kaj skribforme almenaŭ tri monatojn antaŭ la fiksita asembledato, kondiĉe ke ili estis prezentitaj de dudekono de la membroj aŭ estis alsubskribitaj de du Kontrevizoroj.

15. (Voĉdonrajto)
Voĉdonrajtas ĉiuj membroj, kiuj je la dato de la asemblemalfermo jam deksesjariĝis kaj aliĝis kaj pagis kotizon de almenaŭ tri monatoj.
Kiu ne povas ĉeesti povas delegi alian membron.
Neniu membro rajtas prezenti pli ol tri delegilojn.
La malĉeestintaj nedelegintaj membroj povas voĉdoni perletere pri la morala kaj financa raporto kaj pri la baloto por la Nacia Konsilantaro kaj la Kolegio de la Kontrevizoroj. Tiuj estas rigardataj kiel partoprenantaj la Asembleon, rilate nur al la supre menciitaj decidoj.
En la regularo estas difinitaj la manieroj pri la perletera voĉdonado, pri la kontrolo de delegiloj, pri la asembleaj voĉdonadoj kaj pri la voĉkalkulado.

16. (Decidoj)
La partoprenantoj indikas la prezidanton de la Asembleo, la sekretarion kaj tri aŭ kvin voĉkalkulistojn.
La Asembleo decidas valide post la unua kunvoko aŭ referendume se ĉeestas almenaŭ la duono plus unu de la voĉdonrajtaj membroj, post la dua kunvoko kiom ajn estas la nombro de ĉeestantoj.
La decidoj estas alprenitaj laŭ voĉdonplimulto, krom la malsamaj plimultoj postulataj por apartaj fakoj de la leĝo aŭ de tiu ĉi Statuto.
La rezulto de la voĉdonadoj aperas en la protokolo verkita de la voĉkalkulistoj kaj de la sekretario.

b) NACIA KONSILANTARO

17. (Konsisto)
La Nacian Konsilantaron konsistigas nombro de membroj inter deksep kaj dudek unu, difinita, laŭ propono de la Nacia Konsilantaro, de Asembleo dum la dua jaro de ties mandato. Ĉiu voĉdonanto rajtas voĉdoni por maksimume du trionoj de la elektotaj kandidatoj.
Estas nomumitaj tiuj kandidatoj, kiuj ricevis la plej altan nombron de voĉdonoj. Kaze de egaleco estas elektita la pli aĝa.
Por esti elektebla ĉiu kandidato bezonas:
a) esti membro kaj pagi kotizon por almenaŭ tri sinsekvaj jaroj, inkluzive tiun kurantan;
b) esti plene kapabla sin devontigi;
c) esti prezentita de almenaŭ dek voĉdonrajtaj membroj, krom se li/ŝi estas eliranta konsilanto.
Per regularo estas difinitaj la manieroj por prezenti kandidatiĝojn, kiuj devas ĉiukaze alveni al la I.E.F.-sekretariejo almenaŭ tri monatojn antaŭ la balotdato. La Nacia Konsilantaro oficas tri jarojn. Ĝiaj anoj estas reelekteblaj.

18. (Funkciado)
La Nacia Konsilantaro kunsidas laŭ kunvoko de la Prezidanto almenaŭ dufoje jare; ĝi krome devas esti kunvokita laŭ peto de la Estraro aŭ, se prezentiĝas motivita skriba peto, de unu triono de la konsilantoj aŭ de la Kolegio de la Kontrevizoroj. Ĝi estas

kunvokita almenŭ ok tagojn pli frue, per kunvokilo kun la esplorotaj temoj kaj proponoj.
En la kunsidoj de la Nacia Konsilantaro rajtas partopreni, sen voĉdonrajto, la regionaj delegitoj.
Krom per fizika ĉeesto de la partoprenantoj, la kunsidoj povas okazi ankaŭ per utiligo de ĉiuj disponeblaj teknologioj, kondiĉe ke estu garantiataj: identigo de ĉiuj partoprenantoj, samtempa debato en reala tempo kaj partoprenebleco por ĉiuj.
Tiu ano, kiu sen ekskuzita kialo ne partoprenis tri sinsekvajn kunsidojn, estas rigardata demisiinta. Dum la tria kunsido la Konsilantaro deklaras li/ŝian ĉesigon de la ofico. Tiuj membroj, kiuj dum la jartrio kial ajn ĉesas, estas anstataŭigitaj ĝis la mandatofino de la kandidatoj ilin sekvantaj laŭ la vico de ricevitaj voĉdonoj. Se ne estas disponeblaj kandidatoj, la Konsilantaro prizorgas per alelekto, kondiĉe ke restis en la ofico la plimulto de siaj membroj; alikaze la Estraro, aŭ kaze de ĝia vakanteco la Kolegio de la Kontrevizoroj, kunvokas la Asembleon por elekti la novan Konsilantaron.

19. (Kompetentecoj)
La Nacia Konsilantaro, ankaŭ surbaze de la direktivoj aprobitaj de la Asembleo kaj de la indikoj de la Kongreso, antaŭpreparas agadplanon de la Asocio proponotan al la Estraro por plenumi la laŭstatutajn celojn kaj pri la administrado.
Al ĝia aprobo estas submetitaj la ekonomia buĝeto kaj la finaj bilancoj en laŭleĝaj limtempoj, poste prezentotaj al la Asembleo.
Ĝi decidas definitive pri eventuala ekskludo de iu membro decidita de la Estraro.
La Nacia Konsilantaro elektas inter siaj anoj la Prezidanton kaj la vic-Prezidanton de I.E.F. Ili konsistigas la Estraron kune kun aliaj kvin konsilantoj, el kiuj du indikitaj de la Prezidanto kaj tri poste elektitaj de la Konsilantaro.
Iu konsilanto ne rajtas ofici kiel Prezidanto por pli ol ses sinsekvaj jaroj.
Aliaj membroj, per decido de la Estraro, povas esti komisiitaj por difinitaj taskoj; sammaniere ili povas estis nomumitaj en komisionoj kunmetitaj el konsilantoj kaj eventuale ankaŭ el aliaj homoj.
La Nacia Konsilantaro rajtas kiam ajn, pro grava malkonsento, revoki la taskon al la Estraro; en tiu ĉi, kiel en aliaj ĉesokazoj, ĝi prizorgas la renovigon de la Estraro laŭ la manieroj supre priskribitaj.

c) PREZIDANTO
20. La Prezidanto, aŭ kaze de li/ŝia malĉeesto aŭ malhelpo la vic-Prezidanto, reprezentas ĉiuefike la Asocion en ĝiaj rilatoj kun kromaj personoj kaj antaŭ juĝejo, kunvokas kaj prezidas la Nacian Konsilantaron kaj la Estraron, prizorgas la plenumon de la decidoj, raportas al la Estraro kaj al la Nacia Konsilantaro pri rimarkindaj faktoj interesaj por la esperantista movado tutmonde kaj en Italio, kontrolas la verkadon de la raportoj de la Nacia Konsilantaro kaj de la Estraro.

d) ESTRARO
21. (Taskoj)
La estraranoj nomumas inter si unu aŭ du sekretariojn, unu kasiston kaj aliajn komisiitojn kun specifaj taskoj. La Estraro havas la taskon, per siaj decidoj kaj sekvaj agoj, plenumi la decidojn de la Asembleo kaj la agadplanon proponitan de la Nacia Konsilantaro, al kiu ĝi poste raportos pri kio plenumita, sekvi konstante la funkciadon de la sekretariejo, submeti al la aprobo de la Nacia Konsilantaro la finajn bilancojn kaj la buĝetojn.
La Estraro kunsidas kutime ĉiun duan monaton; ĝin kunvokas la Prezidanto per kunvokilo kun la pritraktotaj temoj. La kunvoko de la Estraro povas esti dispoziciita ankaŭ laŭ motivita skriba peto de tri ĝiaj membroj aŭ, rilate nur al financaj kialoj, de la Kolegio de la Kontrevizoroj.
Krom per fizika ĉeesto de la partoprenantoj, la kunsidoj povas okazi ankaŭ per utiligo de ĉiuj disponeblaj teknologioj, kondiĉe ke estu garantiataj: identigo de ĉiuj partoprenantoj, samtempa debato en reala tempo kaj partoprenebleco por ĉiuj.

22. (Kompetentecoj)
La sekretarioj helpas la Prezidanton, zorgas pri la rutinaĵoj, la konservado de registroj kaj dokumentoj, la komunikado kun la centraj kaj malcentraj organoj, kun la membroj kaj la grupoj, kolektas la raportojn de la diversaj komisiitoj.
La kasisto prizorgas la financan administradon laŭ la decidoj de la Estraro kaj la disposizicioj de la Prezidanto.

23. (Komunaj disposizicioj)
La Nacia Konsilantaro kaj la Estraro decidas valide kun ĉeesto de la plimulto de siaj respektivaj membroj. La decidoj estas alprenitaj je voĉdonplimulto; kaze de egaleco venkas la voĉdono de la Prezidanto. Al ĉiuj konsilantoj kaj al la kontrevizoroj la sekretario sendas kopion de la decidoj.
Ekde kiam la Asembleo estas kunvokita por baloto, la membroj de la kolegiaj organoj restas en sia ofico por la rutino ĝis la kunsido de la nova Konsilantaro, kiu devas okazi ĝis unu monato de la elekto.
Ĉiu komisiito kun specifaj taskoj, daŭraj aŭ portempaj, devas de temp' al tempo raporti al la Estraro.

e) KOLEGIO DE LA KONTREVIZOROJ
24. La kontrolo de la administrado estas tasko de la Kolegio de la Kontrevizoroj, konsistanta el tri efektivaj kaj du anstataŭaj membroj, por kies elekto eblas esprimi ĝis tri preferojn. Ilia mandato koincidas kun tiu de la Nacia Konsilantaro.
La manieroj prezenti kandidatiĝojn estas difinitaj per regularo.
Laŭ la vico de la ricevitaj voĉdonoj, la unuaj tri kandidatoj estas nomumitaj efektivaj kaj la aliaj du anstataŭaj; tiu ĉi lastaj postvenas en la sama vico necesokaze. Kaze de voĉdonegaleco, venkas la pli aĝa.
En la unua kunsido la efektivaj revizoroj elektas inter si la Prezidanton de la Kolegio, kiu kunvokas la kunsidojn kutime ĉiun trian monaton.
La revizoroj kontrolas la librotenadon kaj la konsiston de valoroj ĉiufoje kiam oportune kaj prezentas jaran raporton al la Asembleo.
Por plenumi la kontrolojn la Kolegio povas delegi unuopajn siajn membrojn.
La kontrevizoroj devas esti informitaj pri la kunvoko de la Nacia Konsilantaro kaj de la Estraro; ili rajtas partopreni individue al la koncernaj kunsidoj.

f) REGIONAJ DELEGITOJ
25. La Nacia Konsilantaro, aŭdinte la lokajn grupojn, nomumas kie eble unu delegiton po ĉiu regiono, kun trijara ofico.
La regiona delegito reprezentas I.E.F.-n en la zono sub sia kompetento, kunlaboras kun la lokaj grupoj por certigi ilian regulan funkciadon, la kunligon kun la centraj organoj kaj la plenumoj de la asociaj celoj, kunordigas, ankaŭ pere de kontaktoj kun aliaj delegitoj, la manifestadon kaj la agadon de la membroj kaj de la grupoj por faciligi la informagadon, la plej bonan utiligon de la operaciaj rimedoj kaj la formadon de novaj grupoj. De temp' al tempo ĝi prezentas agadraporton al la Nacia Konsilantaro.

Titolo VI. SENPAGECO DE LA SERVOJ
26. Ĉiuj laŭelektaj oficoj kaj la servoj de la membroj estas memvolaj, liberaj kaj senpagaj, krom la elspezrepagoj eksplicite pravigitaj kaj agnoskitaj de la Nacia Konsilantaro.

Titolo VII. NACIA KONGRESO
27. (Organizado)
Kutime ĉiun jaron I.E.F. prenas la inciaton organizi Nacian Esperanto-Kongreson je loko kaj dato deciditaj de la Nacia Konsilantaro, konsiderinte la proponojn el la lokaj grupoj.
La Kongreso estas organizata de komitato starigita tiucele kun la aprobo de la Estraro; tiu komitato akceptas kontribuojn kaj zorgas pri la administrado, pri kiu ĝi sole respondecas; kun la aprobo de la Estraro ĝi difinas la aliĝkotizojn kaj aranĝas la programon.

28. (Celo kaj partopreno)
Pere de kontribuo de studoj kaj proponoj la Kongreso indikas la ĝeneralajn vojojn de la agado plenumenda por realigi la programajn celojn de la movado.
Al la kongresaj eventoj, laŭ manieroj difinitaj de la organiza komitato, povas esti invitataj ankaŭ nekongresanoj, esperantistoj nemembroj kaj publiko.
En la kunsidoj por la I.E.F.-Asembleo partoprenas la membroj ankaŭ se ne aliĝintaj al la Kongreso.

Titolo VIII. ĈESIGO KAJ LIKVIDADO
29. Por decidi la ĉesigon de I.E.F. kaj la asignadon de ĝia havaĵo necesas la favora voĉdono de almenaŭ tri kvaronoj de la voĉdonrajtaj membroj.
Okaze de likvidado de I.E.F., la neta posedaĵo estos disdonata favore al organizoj sen profita celo kiuj havas similajn karakterizojn kaj samajn instituciajn celojn de I.E.F., kun ekskludo de ĉiu disdivido inter la membroj.

Titolo IX. MODIFIGO KAJ PLENUMO DE LA STATUTO
30. (Modifoj)
Por modifi ĉi tiun Statuton necesas la partopreno de almenaŭ duono plus unu de la voĉdonrajtantoj kaj la favora voĉdono de la plimulto de la partoprenintoj.

31. (Regularo)
Por la plenumo de ĉi tiu Statuto la Nacia Konsilantaro de I.E.F. decidas la laŭregularajn disposiziciojn specife antaŭviditajn kaj tiujn, kiuj montriĝos necesaj, ankaŭ en malsamaj tempoj.